ISSN 0299-092X

# monda solidareco

N-ro **115 - Novembro 2015** - kvaronjara - **1.25 €**

# *Solidareco kontraŭ Ekzilo*

Fanatikismoj, diktaturoj, subigoj, holokaŭstoj, grandskalaj murdoj… kaj tiam estas fuĝo, elmigro, ekzilo de kompletaj loĝantaroj pelataj pro timo. Je kosto de neimageblaj suferoj, de verŝita sango kaj de oferitaj vivoj, sed movigataj per la espero de aliloke ankoraŭ ekzistanta estonteco, homamaso ekmoviĝas – vivnepra kolektiva savreflekso de homgrupoj fronte al minaco de definitiva malapero.

Kien iras tiuj homoj ? Kion ili serĉas ? Kion ili esperas ?

Ili venas al ni, kiuj estas la privilegiuloj de nia planedo kaj esperas iom da humaneco, solidareco, partigo.

La respondo de la landoj plej riĉaj en la mondo estas klara : kvotoj kaj barikadoj, pikdratoj kaj detenejoj, hida aserto de « nia blanka raso » kaj rifuzo konsenti peceton de nia riĉaĵo. Necesas la ŝoko de teruraj fotoj por veki indignan emocion kaj ekigi kelkajn solidarajn moviĝojn en la loĝantaro.

Akcepti kaj protekti rifuĝintojn estas homa devigo. Rifuzi tion aŭ eĉ heziti, estas aktiva kontribuo al la masakro. Neŭtraleco ne ekzistas.

**Marc Dufumier** asertas kaj pruvas :

Fanatikismoj, diktaturoj, subigoj, holokaŭstoj, grandskalaj murdoj tre ofte fontas el mizero. Origine, la problemo estas ege agrikultura kaj aktive pluigata. Forprenante de la familioj la terpecojn, kiuj nutras ilin, tio celas dependigi la homojn de potencaj kaj pezegaj subigaj industrioj kaj strukturoj. La alternativo por ne morti estas tiam kunlabori aŭ fuĝi.

Kiu povas esti la pozicio kaj la agado de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato en tiu malbonaŭgura scenaro

**Pierre Rabhi** sugestas respondon raportante pri la amerindiana legendo de la kolibro legebla el http://www.colibris-lemouvement.org :

*Iutage, diras la legendo, okazis arbara fajrego. Ĉiuj teruritaj kaj konsternitaj bestoj, senpovaj observis la katastrofon. Nur la malgranda kolibro aktivis, irante kolekti kelkajn gutojn per sia beko por ĵeti ilin sur la fajron. Post momento, la dazipo, agacita pro tiu ridinda aktiveco, diris al ĝi : « Kolibro ! Ĉu vi ne estas freneza ? Ne per tiuj akvogutoj vi estingos la fajron ! » Kaj la kolibro respondis al ĝi : « Mi tion scias, sed mi faras mian parton »*

Ebligante al agrikulturistoj aŭ al bredistoj plenumi laboron, kiu havigas al ili dignan vivon, MSM partoprenas en la batalo kontraŭ mizero. Perlabori sian vivon sur sia terpeco, tio estas povi tie manĝi, pluvivigi siajn tradiciojn kaj valorojn, evoluigi lernejon, edukadon, kiu respektas ĉiujn kaj fine rezisti al la fanatikismoj, diktaturoj kaj subigoj.

Ni ne iluziiĝu : MSM ne solvos ĉion, sed farante sian parton, eble kontribuos al iometa limigo de tiu migrado de la malfeliĉo, kiu mirigas nin kaj nin inundas. Utopio, revado, kion vi diras ?

**René Dumont** jam respondis : ***Utopio aŭ Morto !***

*Pierre Tournier*

## Enhavo

Solidareco kontraù ekzilo ..........................................p. 1
Misio en Sokodeon ....................................................p. 2
Konstrui daùrivan estontecon ................................ p. 3-4
La vojoj de la solidareco......................................... p. 5-7
El la Administra Konsilantaro ..................................p. 8
Kolofono.....................................................................p. 8

**Legi aŭ relegi :**

« Famine au Sud, malbouffe au Nord. Comment le bio peut nous sauver », de Marc Dufumier Nil, 2012, 194 p.

**Vizitu la interretejon** : http://www.colibris-lemouvement.org/

Legi aŭ relegi... aŭ malkovri : « L'Utopie ou la Mort », de René Dumont, eld. Éditions du Seuil, 1973, ĝisdatigita en 1974 ; reeldono en 1978, 189 p.

*La specifeco de MSM estas meti la problemon de la individua rajto sin nutri je la nivelo de monda juro kaj celi respondi al ĝi pere de transnacia organizado de la solidareco sub la juĝorajto de la Kongreso de la Popoloj.*

# Misio en Sokodeon



Monda Solidareco kontraŭ la Malsato en Sokodeo

**Symphorien Meda**, administranto kaj elektito de okcidenta Afriko ricevis mision ekkontakti la membrojn de nia asocio (= Glob-id-ar-anojn) en Sokodeo kaj aranĝi la kondiĉojn de la elekto de estraro por la ***Loka Asocio de MSM*** (Monda Solidareco kontraŭ la Malsato) Por tio, li profitis de la kunlaborado de **John Agbéli**, prezidanto de la Togolanda asocio « ***Globidar*** ». Ambaŭ restadis en Sokodeo de la 26a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2015 kaj renkontis plejparton el la responsantoj de la grupoj.

***« Jen la okazo laŭdi la spiriton de solidareco kaj kunlaboremo de iuj kaj aliaj, kiuj lerte klopodis por respondi al la invitado aŭ por partopreni en la renkontoj ».***

La rendevuoj en la « Amikeca rondejo » de Sokodeo alternis kun la surlokaj vizitoj.

El tiuj renkontoj rezultas, ke kelkaj grupoj renkontis gravajn malfacilaĵojn, sed ke volo kaj determino de la restantaj membroj pluas. La plimulto de la partoprenantoj esprimis deziron ekhavi animstrukturon. Kunsido de ĉiuj membroj de MSM ebligis elekti provizoran estraron, kiu konsistas el :

- Prezidanto : S**-ro Massimayele Donko**
- Sekretario : **S-ro Kinanziba Bélel**
- Kasistino : **S-ino Adam Djenabou.**



*Decidiga kunveno*

Tiu estraro kunvoku Ĝeneralan Asembleon dum la ses venontaj monatoj kaj aranĝi la balotelekton de daŭra estraro.



*Vizito al SADA*

Tiu misio havis kiel efikon la refaradon de la kontaktoj inter la membroj de tiu regiono post du dormetaj jaroj sekve de la malakcepto far la Federacia Administra Konsilantaro de prezidanto kiu malbone kondutis kun MSM.

La Administra Konsilantaro dankas la grupestrojn, kiuj disponigis sin, malgraŭ siaj aktivecoj, por kontentigi la petojn de la delegacio. Ĝi dankas kaj gratulas Symphorien kaj John pro la kvalito de ilia klopodado, pro tio, ke dum la renkontoj plej gravas respekto kaj digneco.

Ĝi gratulas ankaŭ la novan estraron en Sokodeo kaj transdonas al ĝi siajn kuraĝigojn por la tasko, kiun ĝi prikonsentis.



*Vizito ĉe la grupo Diwoudaré*

*En sia kunveno de la 26-a kaj 27-a de septembro, la Federacia Aministra Konsilantaro de Monda Solidareco kontraŭ Malsato decidis asociiĝi al tiu « Monda tago pri mizerrifuzo ».*
*Tiu rifuzo validas ne nur por tiu monda tago, sed ankaŭ al ĉiuj tagoj de ĉiuj jaroj*

**La 17-an de oktobro 2015 : Monda tago pri mizerrifuzo**

# Konstrui daŭrivan estontecon :

## Unuiĝi por ĉesigi malriĉecon kaj diskriminacion

Konstrui daŭrivan estontecon postulas pliintensigon de niaj klopodoj por forigi ekstreman malriĉecon kaj diskriminacion, kaj por certigi al ĉiu plenan ĝuon de ties fundamentaj rajtoj. La plena partopreno de la personoj vivantaj en malriĉeco, aparte en la decidoj pri iliaj vivoj kaj homgrupoj, devas esti en la centro de la politikoj kaj strategioj celantaj daŭrivan estontecon.

Tiel, ni povas garantii ke nia planedo kaj niaj socioj kapablas respondi al la bezonoj kaj esperoj de ĉiuj – kaj ne nur al tiuj de kelkaj privilegiuloj – por la nuna generacio kaj la estontaj.

Ĉijare, la internacia tago por la forigo de malriĉeco havas apartan signifon, ĉar ĝi estis la unua celebrado post la definitiva aprobo de la Celoj de la Daŭriva Evoluigo fare de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj. En tiu nova kadro de evoluigo, kiu celas anstataŭi kaj daŭrigi la Celojn de la Jarmilo por la Evoluigo, ĉiuj landoj decidis ĉesigi la malriĉecon en ĉiuj ties dimensioj kaj formoj.



Konsekvence, estas aparte bonvena ke la temo – elektita de Unuiĝintaj Nacioj, konsulte kun personoj vivantaj en malriĉeco kaj organizaĵoj el la civila socio – agnosku ke ĉiuj devas unuiĝi por ĉesigi malriĉecon kaj diskriminacion por konstrui daŭrivan estontecon en kiu la nunaj bezonoj estos plenumitaj sen kompromiti la kapablon de la estontaj generacioj plenumi siajn proprajn.

Tiel, la nunaj produktaj kaj konsumaj manieroj estas nek respondo al la bezonoj de milionoj da personoj, kiuj vivas en ekstrema malriĉeco nek daŭrivaj. – **Daŭriva estonteco necesigas, male, socian ŝanĝiĝon, kiu respektas kaj protektas la homajn rajtojn, la kulturan diversecon kaj la medion, kiu reduktas la ekonomiajn neegalaĵojn kaj kiu ebligas ĉie socian inkludiĝon. Tio necesigas ekonomian kreskon, kiu nek rabas nek detruas niajn naturajn rimedojn aŭ ne senvalorigas la laboron, sed kiu aktive protektas nian medion kaj apogas la laboristajn rajtojn.**

La sukceso de tiu transiro al ekonomio pli verda kaj pli justa superas la simplan uzon de la teknologia progreso kaj plian investadon. Nia kreskanta ekonomia, socia kaj media interdependo postulas ke ni ankaŭ konstruu daŭrivajn kaj respektajn rilatojn inter la personoj, la homgrupoj kaj la nacioj, kaj ke ni dividu inter ni la konojn je ĉiuj niveloj.

*Daùrigo sur la p.4*



La ekonomiaj kaj sociaj politikoj, la strategioj kaj la prioritatoj kondukitaj en la lastaj jardekoj kontribuis al la malboniĝo de la medio, al ne daŭriva kresko, al neegalaĵoj kaj al neniam vidita socia maljusteco.

Ili devas esti ŝanĝitaj aŭ forlasitaj. Ni devas distingi inter la agadoj, kiuj devus esti plikuraĝigataj ĉar ili estas daŭrivaj kaj respondas al la fundamentaj bezonoj de ĉiuj homoj, kaj tiuj, kiuj devas esti senkuraĝigitaj ĉar ili respondas nur al senutilaj aŭ nedaŭrivaj bezonoj. Aparte la registaroj devas garantii ke la personoj vivantaj en ekstrema malriĉeco ne plu estu devigataj labori por la plej malaltaj salajroj kaj/aŭ en la plej malfacilaj kondiĉoj, tie, kie estas nek sekureco nek socia protekto.

Ni devas lerni per la doloraj lecionoj de la freŝdata monda financa kaj ekonomia krizo post kiu la relanĉaj politikoj, kiuj subtenis la socian protekton kaj la vivrimedojn de la plej malfortaj estis anstataŭigitaj per aŭsteraj dispozicioj, kiuj transdonis la ŝarĝon de la alĝustigo al la ordinaruloj, aparte al tiuj, kiuj vivas en malriĉeco aŭ lime de malriĉeco.

**Kiam la registaroj rapidis por savi la financajn instituciojn, kiuj estigis la krizon, ili samtempe draste reduktis la publikajn elspezojn, kio pligravigis unue la situacion de la personoj vivantaj en malriĉeco.**

Necesas agnoski ke la personoj kiuj estas marĝenigitaj aŭ diskriminaciitaj socie, ekonomie, kulture aŭ laŭ iu ajn alia maniero, estas malfortaj ne nur kontraŭ la efikoj de la klimata ŝanĝiĝo kaj la malboniĝo de la medio, sed ankaŭ kontraŭ la negativaj rezultoj de la politikaj agoj por limigi aŭ redukti tiujn efikojn. **Tiel politikoj kun kresko de la nutraĵprezoj estos proporcie multe pli malfavoraj al personoj vivantaj en malriĉeco**. Konsekvence, plej gravas ke je ĉiuj niveloj, la agoj por daŭriva medio obeu la direktajn principojn de Unuiĝintaj Nacioj pri ekstrema malriĉeco kaj la homajn rajtojn por garantii, ke ili ne havu negativan trafon al la ĝenerala publiko kaj aparte al la personoj, kiuj vivas en ekstrema malriĉeco.

**Daŭriva mondo ne povas ekzisti, kiam plu estas malriĉeco, diskriminacio kaj perfortoj al la homaj rajtoj. Daŭriva mondo postlasu neniun.**

Tiu artikolo estas eltirita el la interretejo : "Refuserlamisere.org" :
http://refuserlamisere.org/article/note-explicative-du-theme-international-du-17-octobre-2015



# La vojoj de la solidareco

**La vojoj de la solidareco pasas tra Burkinio**



La grupo **Toyow en Padema** konsistas el 10 inoj. Ties prezidantino estas Doubadale Biata, sekretariino S-ino Dao Bougouyere Haoua, kaj kasistino Konaté Haoua.



*La grupo Toyow en Padema*

Samtempe kiel la agrikulturaj aktivecoj, tiuj inoj havas aliajn enspezigajn aktivecojn. Ili kolektas kariteajn nuksojn kaj transformas ilin en karitean buteron, kiujn ili komercigas de 15 jaroj. El la butero ili fabrikas sapon, kiun ili vendas surloke, en la bazaroj. En 2001 ili havigis al si ateston de partopreno en la Karitea Foiro de Vagaduguo, kiu malproksimas je ses horoj de busa vojaĝo ekde Bobodiulaso.



*Kariteaj nuksoj*

La Globidaraninoj de Toyow kultivas ankaŭ arakidojn, gombon, milion, sezamon kaj maizon, kaj fabrikas aromaĵon t.n. « Soumbala » (preparaĵo el parkiaj grajnoj uzata por gustigi saŭcojn).



*Sapobuloj*

Por plibonigi siajn enspezojn kaj valorigi la lokajn produktojn, la grupaninoj prezentis al MSM sian projekton de fabrikado de sapoj por sinlavado kaj lesivado el la karitea butero. La havigota mono estas destinita al la aĉeto de krudmaterialoj (karitea butero, kokosoleo, ktp.) kaj disponi pri multaj materialoj (muldiloj, pelvoj, ŝablonoj, ortiloj, mana sapstampilo, miksilo, pistatoro, pesilo, areometroj, tranĉtabulo, gantoj, sekur-okulvitroj, maskoj). Ilia produktokapablo pligrandiĝis same kiel iliaj enspezoj. Ili planas jaran produktadon de 11200 sapobuloj. La enspezaro estos tiel dividitaj : aĉeto de krudmaterialoj, repago al MSM, operacia kapitalo, monsumoj por la 10 membroj, ŝparado.



*Mana sapstampado*

La grupo **Yankadi en Padema** fondiĝis en 1995 kaj ties membroj aliĝis al MSM en 2000.

La prezidanto estas S-ro Moussa Zossin Konate, la sekretario S-ro Sanou Brahima Nama kaj la kasisto S-ro Zalle Arouna.

La 10 homoj de tiu grupo kultivas milion, maizon, sorgon, sezamon, fazeolon, arakidojn kaj kotonon. Ili praktikas ankaŭ bestbredadon kaj ĝardenkulturadon.



***La grupo Yankadi en Padema***



***Maiza kampo***

Por lukti kontraŭ la malriĉeco per la plibonigo de la prinutra memsufiĉeco ili prezentis al MSM projekton de maizkultivado por la familia konsumado kaj por la disvendado. Tiu projekto estis akceptita de la Administra Konsilantaro kaj financita en junio 2015. La monsumo estas dediĉita al la aĉeto de la semoj kaj grasumoj.



***Maiza kampo***



***MSM-renkonto en Padema***

## Ambaŭ projektoj estis kunfinancitaj de :

***Civitanoj de la Mondo en Puatuo-Ĉarentoj (kontribuo de 800 €)***

***Regiono Puatuo-Ĉarentoj (kontribuo de 850 €)***

***Monda Solidareco kontraù la Malsato (kontribuo de 1398 €)***

## La vojoj de la solidareco pasas tra Burkinio



*Ĉe S-ino prezidanto de la grupo AFDES*

**La grupo AFDES** (Ina Asocio por Ekonomia kaj Sociala Evoluigo) situas en la dua sektoro de Bobodiulaso en Burkinio. La plimulto de tiu dekopa inaro estas vidvinoj kun junaj infanoj. Ili aliĝis al MSM en 2010. La prezidantino de AFDES estas S-ino Ouattara Nanfatimata, la sekretariino S-ino Traoré Bintou kaj la kasistino S-ino Sanou-Traoré Dadidiatou. Tiuj inoj praktikas la vendadon de sorgo, maizo, milio, fazeolo, karitea butero de antaŭ pluraj jaroj. Duono el ili plentempe deĵoras. Ili deziras plibonigi siajn vivkondiĉojn kaj prezentis al MSM projekton de grentenejo kaj de prilaborado de karitea butero. Post aprobo fare de la Administra Konsilantaro, tiu projekto ricevis sian financadon en oktobro 2015. La monsumo ebligos aĉeti grenojn, sakojn por detalvendado, padelojn, unu baŝon, kaj lupreni tenejon.



*La ina grupo Gnongondeme*

**La ina grupo Gnongondeme** (« interhelpo » en loka diula lingvo) situas en Bobodiulaso. La sidejo troviĝas en la 24a sektoro. Multaj ne kvalifikitaj homoj serĉas enspezigajn aktivecojn, sed manke de alirkapablo al la loka mikrokredito, ili marĝenumas kaj devas kontentiĝi per etaj aktivecoj de revendado sur la trotuaroj aŭ en la bazaroj. La grupaninoj de Gnongondeme, kiu loĝas en diversaj kvartaloj de tiu urbo decidis komunigi siajn fortojn por plibonigi siajn vivkondiĉojn. Ili aliĝis al Monda Solidareco kontraŭ la Malsato en 2008. La prezidantino de Gnongondeme estas S-ino Traoré-Zoury Mariam, la sekretariino S-ino Kinane Fatou kaj la kasistino S-ino Traoré Annie. La aktiveco de la grupo konsistas en aĉetado kaj disvendado de grenoj. Por disponi pri pli grava vendostoko, tiuj globidaraninoj redaktis projekton de grentenejo, kiun ili sendis al MSM. Studite dum kunsido de la Administra Konsilantaro la projekto ricevis aprobon kaj la financado estis pagita en oktobro 2015.

## La solidarecaj vojoj pasas tra Kenjo




La kokinbreda projekto de la Kenja grupo **TUMAINI** Support Group de Munias, ricevis aprobon de la Administra Konsilantaro dum la kunsido de la 26a kaj 27a de septembro 2015 al financado.

# Eĥoj el la Administra Konsilantaro

**La membroj de la Federacia Administra Konsilantaro kunvenis la 26an kaj 27an de septembro 2015 en Niort (Francio, 79) sub la prezido de Daniel Durand**

## Interna funkciado :



- **Togolando – Sokodeo** : Symphorien Meda kaj John Agbeli al kiuj estis konfidita misio al Sokodeo efektivigis ĝin fine de julio 2015. (V. en p. 2).
- La Administra Konsilantaro dankeme gratulas ilin same kiel ĝi gratulas kaj kuraĝigas la novan provizoran estraron de la Loka Asocio de MSM en Sokodeo. Tiu estraro estis elektita fine de la misio.
- **Alvoko al volontuloj** : kelkaj homoj pozitive respondis. La alvoko pluas.

## La projektoj :

En **Benino** la Pluzorga kaj Kunordiga Buroo informas en sia trimonata raporto pri la aliĝo de kvin grupoj.

En **Burkinio**, tri projektoj estis aprobitaj kiel financotaj. Temas pri AFDES (15.01.BF), Gnongondeme (15.02.NF) kaj Wakogldo  (15.03.BF).

La Administra Konsilantaro konsentas pri la peto de prokrastigo, kiun petis du grupoj en Torla (**Eburio**) pri la repago de la lasta parto de siaj pruntoprenoj.

En **Kenjo** la grupo Tumaini (15.04.KE) estas deklarita financota.

En **Togolando**, Ĉemara kaj Altebena regionoj, du grupo « Novissi-1 kaj Novissi-2 aliĝis al MSM.

Pluraj aliaj grupoj interesiĝas.

## Komunikado, animadoj :

MSM alportis sian subtenon kaj sian ateston dum la Monda tago pri mizerrifuzo (17an de oktobro).

**Pluraj manifestacioj estas planitaj, inter kiuj :**

- ekspozicio de fotoj de MSM en la Kultura Centro de Poitiers-Beaulieu (Francio, 86) kaj informado dum publika kunveno,  komence de decembro.
- Tago de Sociala kaj Solidara ekonomio la 21an de novembro en Ungersheim (Francio, 68)
- La estonta kunsido de la Administra Konsilantaro okazos la 5an kaj 6an de decembro en la Kultura Centro de Poitiers-Beaulieu.

**monda solidareco** estas bulteno eldonata de *Monda Solidareco kontraŭ la Malsato*

**JE VIA DISPONO :**

- Aliĝiloj
- Flugfolioj pri projektoj
- Pliajn bultenojn
- Federacia Reglamento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
- Afiŝetoj (A3-formato)

*Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

*Nur por Eŭropo :*

- Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikotĉemizoj 15 € kun la emblemeto « *Fonds Mondial* ».
- Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemeto : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €
- Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

*Se vi konstatas malfruiĝon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.*

**KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ :**
***Kiel pagi ?***

- per franca ĉeko al **Globidar**
- per poŝtaj rimedoj, je la nomo de : **SMF- MONDA SOLIDARECO** (PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z) RIP: **FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056**
- per banka karto aŭ **PayPal** tra la retejo www.globidar.org
- ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.
- UEA kontoj : **mfsk-g**

*Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno*

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno.  Vi bonvolu kontroli ĝin !

**RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ**

| | |
|---|---|
| Aŭgusto 2015 | 432 € |
| Septembro 2015 | 807 € |
| Oktobro 2015 | 894 € |

*MONDA SOLIDARECO* estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

**Jara abono : 5 €**

**Redakcia komitato** : Claudine Tournier, Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, John De La Cruz, Edwige Géniteau, Christian Trianneau
**Fotoj** el la fototeko de MSM
**Emblemo** : Yamsina Sahraoui
Elfrancigis  Daniel Durand, kaj Christian Bertin
Kontrolis (ne)

Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n° 0410 G 86482.
Imprimerie de l'association.

Tel : +33 (0)241 78 47 75
info@globidar.org
**www.globidar.org**

*MONDA SOLIDARECO*
Les Nids
**FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE**
Francio